# *Raúl Castro akceptis la vicprezidenton elektitan de Urugvajo.*



La kuba prezidento Raúl Castro akceptis ?i-?a?de la elektitan vicprezidenton de Urugvajo kiu plenumas viziton en la insulo.

Dum la renkonti?o, oni konstatis la eminentan staton de la amikaj kaj kunlaboraj rilatoj inter amba? registaroj kaj popoloj. Oni same pritraktis diversajn temojn de internacia aktualeco.

Flanke de Kubo anka? partoprenis la unua vicprezidento Miguel Díaz-Canel kaj la ministro pri eksteraj rilatoj, Bruno Rodríguez Parrilla.

Aliaj kunsidoj okazis kun la prezidanto de la nacia asembleo de Kubo, Esteban Lazo; kun Antonio Carricarte, ministro pri ekstera komercado kaj kun José Ramón Balaguer, estro de la departemento de internaciaj rilatoj de la centra komitato de la komunista partio

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/44444-raul-castro-akceptis-la-vicprezidenton-elektitan-de-urugvajo

**Radio Habana Cuba**